

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)  
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.  
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 4, n-ro 4 (22): novembro-decembro 2011  
Antaŭaj numeroj haveblas ekde la 13-a.  
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47  
Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

## Redaktore...

*Karaj Gelegantoj,*

*Denove vintro proksimiĝas kaj 2011 kuras al sia fino. Ĉu ĝi alportis al la mondo pli da paco, feliceco kaj justeco?*

*La problemoj en la mondo estas grandaj, ne nur pro la varmigo de la tero kaj la enorma kresko de la monda loĝantaro, sed ankaŭ pro la individua kaj kolektiva egoismo.*

*La fino de la financa kaj ekonomia krizo ankoraŭ ne estas videbla. Kiu do regas la landojn: la politikistoj, kiujn ni elektis, aŭ la financaj institucioj, kiuj ludas per nia mono?*

*Laŭ mi oni devus malpermesi al la bankoj iri al la borso, ĉar ili traktas monon kvazaŭ ĝi estus produkto. Mono ne estas produkto, sed pagilo. Oni estigis la borsojn por aĉeti kaj vendi produktojn je distanco. Se la vendo de ia varo ne prosperas, tio trafas nur la produktantan fabrikan, ĝiajn laboristojn kaj vendistojn. Ĉe mona krizo suferas ne nur la bankoj, sed ĉiuj homoj perdas monon. Ili vidas ne nur malkreski la valoron de sia mono, sed devas poste ankaŭ pagi pli da impostoj por permesi al la ŝtatoj savi la bankojn. Grava krizo ne nur malriĉigas ĉiujn homojn, sed povus eĉ detrui la tutan ekonomian kaj socialan sistemon. Tial estas nek ekonomie nek morale permeseble, ke la financaj instutoj tiel traktu la monon de siaj ŝparemaj klientoj.*

*Oni devus ankaŭ mondvaste malpermesi la spekuladon per mono. Monspekulantoj aĉetas kaj vendas monon, ankaŭ traktante ĝin kiel produkton, tiel pliriĉigante sin sen labori!*


*Tamen agrablan legadon!*

*Pieter Jan Doumen*

## Dua Libro de l' Lingva Internacia (3) (Tweede boek van de Internationale Taal (3))

c) Aliaj skribis kritikon pri mia afero, eĉ ne leginte bone mian malgrandan broŝuron kaj eĉ ne peninte kompreni la aferon. Tiel ekzemple

la unuatempanajn signetojn inter la partoj de l' vortoj ili tute ne komprenis, kaj skribante ekzemple "ensonĝ, oprinc, in, o, nmivid, is" (anstataŭ "en song' o princ, in, o, n mi vid' is"<sup>1</sup>), ili regardigis siajn legantojn, "kiel malbonsona kaj nekomprenebla la lingvo estas"! La projekton de l' tutmonda voĉdono, kiu kun efektiva kaj senkondiĉa signifo de l' lingvo tute ne estas kunligita, kaj kiu estas proponita sole por tio, ke la lingvo pli rapide el 'internacia' fariĝu 'tutmonda', ili prenis por la plej grava kaj fonda parto de l' afero kaj komprenigis la legantojn, ke "ĉar dek milionoj da adeptoj neniam estos kolektitaj, tial la afero tute ne havas estontecon"! Kelkajn fojojn mi eĉ legis longajn artikolojn pri mia afero, kie estis videble, ke la aŭtoroj eĉ ne vidis mian verkon.



D-ro Zamenhof en sia studĉambro, Dzika strato, Varsovio

e) Aliaj, anstataŭ paroli pri la utileco aŭ sentileco<sup>2</sup> de mia lingvo, donis sole sensencajn ŝercojn, kiuj de iliaj legantoj estis eble prenataj por kritiko, ĉar multaj legantoj propran juĝon ne havas, kaj la plej malsaĝaj ŝercoj je ia afero estas por ili sufiĉa vidigo, ke la afero estas 'ridinda' kaj taŭgas por nenio.

Mi ne deziras laŭdon, mi volas, ke oni min helpu forigi la erarojn, kiujn mi faris, kaj ju pli la kritikoj de mia lingvo estas pli severaj, des pli danke mi ilin alprenas, se ili nur havas la celon ne ridi sen senco aŭ insulti sen kaŭzo. Mi scias tre bone, ke la verko de unu homo ne povas esti senerara, se tiu homo eĉ estus la plej genia kaj multe pli instruita ol mi. Tial mi ne

<sup>1</sup> Zamenhof uzis tiujn apostrofojn nur por montri, kiel la vortoj estas kunmetataj, nome per simpla kungluado de la diversaj vorteroj!

<sup>2</sup> Rusismo por 'sentileco'.


donis ankoraŭ al mia lingvo la finan formon: mi ne parolas<sup>3</sup>: “Jen la lingvo estas kreita kaj preta, tial mi volas, ke tia ĝi estu kaj tia ĝi restu!” Ĉio bonigebla estos bonigata per la konsiloj de l’ mondo. Mi ne volas esti ‘kreinto’ de l’ lingvo, mi volas nur esti ‘iniciatoro’<sup>4</sup>. Tio ĉi estu ankaŭ respondo al tiuj amikoj de l’ lingvo internacia, kiuj estas neatendemaj kaj volus jam vidi librojn kaj gazetojn en la lingvo internacia, plenajn vortarojn, vortarojn nacia-internaciajn kaj cetere. Ne malfacile estus por mi kontentigi tiujn ĉi amikojn, sed ne forgesu, ke tio ĉi estus danĝera por la afero mem, kiu estas tiel grava, ke estus nepardoneble faradi<sup>5</sup> laŭ propra decido de unu homo. Mi ne povas diri, ke la lingvo estas preta, ĝis ĝi estos trairinta la juĝon de l’ publiko. Unu jaro ne estas eterno, kaj tamen tiu ĉi jaro estas tre grava por l’ afero. Tiel ankaŭ mi ne povas fari iajn ŝanĝojn en la lingvo tuj post la ricevo de la konsiloj, se tiuj ĉi konsiloj eĉ estus la plej senreraraj kaj venus de la plej kompetentaj personoj. En la daŭro de la tuta jaro 1888 la lingvo restos ‘tute sen ŝanĝo’; sed kiam la jaro estos finita, tiam ĉiuj necesaj ŝanĝoj, antaŭe analizitaj kaj provitaj, estos publikigitaj, la lingvo ricevos la finan formon, kaj tiam komenciĝos ĝia plena funkciado. Juĝante laŭ la konsiloj, kiuj estis senditaj al mi ĝis hodiaŭ, mi pensas, ke la lingvo kredeble estos ŝanĝita tre malmulte, ĉar la plej granda parto de tiuj konsiloj estas nepraktika kaj kaŭzita de ne sufiĉa pripensado kaj provado de l’ afero; sed diri, ke la lingvo tute ne estos ŝanĝita, mi tamen ne povas. Cetere, ĉiuj proponoj, kiujn mi ricevos, kune kun mia juĝo pri ili, estos prezentataj al la juĝo de l’ publiko aŭ de ia el la jam konataj instruitaj akademioj, se inter tiuj ĉi estos trovita unu, kiu volos preni tiun ĉi laboron. Se ia kompetenta akademio min sciigos, ke ĝi volas preni tiun ĉi laboron, mi tuj sendos al ĝi la tutan materialon, kiu estas ĉe mi, mi fordonos al ĝi la tutan aferon, mi foriros kun la plej granda ĝojo je eterne de l’ sceno<sup>6</sup>, kaj de aŭtoro kaj iniciatoro mi fariĝos simpla amiko de l’ lingvo internacia, kiel ĉiu alia amiko. Se tamen nenia el la instruitaj akademioj volos preni mian aferon, tiam mi daŭrigos la publikigadon de l’ proponoj, sendataj al mi,

<sup>3</sup> Rusismo por “mi diras”, ĉar en la rusa “я говорю” signifas “mi diras” aŭ “mi parolas”.

<sup>4</sup> Nuntempe: ‘iniciatinto’.

<sup>5</sup> Agadi.

<sup>6</sup> Nuntempe: ‘scenejo’.



kaj laŭ mia propra pensado kaj laŭ pensoj de la publiko, sendataj al mi, mi mem antaŭ la fino de l’ jaro, decidis la finan formon<sup>7</sup> de l’ lingvo kaj mi sciigos, ke la lingvo estas preta.

La nombro 10.000.000, pri kiu estas parolita en mia unua averko, ŝajnas al multaj absolute ne ricevebla. La plej granda parto de l’ mondo efektive kredeble estos tiel senmova, ke ĝi de si mem ne donos voĉon, malgraŭ ke la afero estas tiel grava kaj la laboro de l’ voĉdono tiel malgrandega. Sed se l’ amikoj de l’ lingvo internacia, anstataŭ timegi la nombron, laboros por la afero kaj kolektos tiom da voĉojn, kiom ili povos, tiam la necesa nombro da voĉoj povas esti ricevita en la plej mallonga tempo.

Kiam mi proponis la voĉdonon, mi profunde kredis, ke pli frue aŭ pli malfrue 10.000.000 da voĉoj estos kolektitaj. La rezultatoj, kiuj sin montris ĝis hodiaŭ, ankoraŭ plifortigas mian kredon. Sed ni prenu, ke mi fantazias, ke mi eraras, ke mi tro multe esperas, – ke sur la tuta tero ne estos kolektita eĉ unu miliono da voĉoj, kion l’ afero tiam perdos? Kelkaj konsilas al mi, ke mi forĵetu la voĉdonon aŭ ke mi malgrandigu la nombron da postulataj voĉoj ĝis unu miliono, “ĉar”, ili diras, “danke al la fantazia punkto de l’ voĉdono, l’ afero, per si mem tiel utila, povas fari fiaskon.” Sed kie, sinjoroj, vi prenis, ke la veno al celo de l’ afero dependas de l’ rezultatoj de la voĉdono? Tiuj, kiuj trovas, ke mia lingvo estas inda je lerno, sendas al mi promesojn senkondiĉajn kaj lernas la lingvon sen ia atendo. Sendepende de l’ iro de la voĉdono en tiu ĉi lingvo estos eldonataj libroj kaj gazetoj, kaj la afero sin movos antaŭen. La voĉdonon mi proponis sole por tio, ke al la afero povu esti altiritaj per unu fojo

<sup>7</sup> Nuntempe: ‘pri la fina formo’

tutaj amasoj da homoj, ĉar mi scias, ke preni ian laboron, eĉ la plej malgrandan, ne ĉiu konsentos, sed helpi aferon tre utilan, kie estas postulata nek laboro, nek mono, nemultaj mal-konsentos, tiom pli, se troviĝos memorigantoj. Mi ripetos: profunde mi kredas, ke pli frue aŭ pli malfrue 10.000.000 da voĉoj estos kolektitaj, kaj tiel je unu bela tago ni sciiĝos, ke la lingvo internacia fariĝis tutmonda; sed se la nombro de l' voĉoj neniam venus al dek milionoj, la afero pro tio ĉi ne estus perdita.

*D-ro L.L. Zamenhof (Daŭrigota)*

### **Taglibro de Dang Thuy Tram** (*Dagboek van Dang Thuy Tram*)

Fine de la dua trimestro de 2011 aperos la esperanta versio de la *Taglibro de Dang Thuy Tram* kun la titolo *Hieraŭnokte mi revis pri paco*. Tiu libro plorigis ĉiujn vietnamojn ĝin legantajn. Temas pri taglibro de civila doktorino, deveninta de la Nordo, kiu skribis ĝin de kiam ŝi eniris la Sudon, ĝis kiam ŝi forferis sian vivon.



La patro de Tram estis doktoro, kaj ŝia patrino farmaciistino, prelegantino ĉe la Farmacia Universitato. Ŝi mem estis studentino de la Medicina Universitato. Ĝus diplomite, Tram povus tre facile trovi laboron en Hanojo. Tial multaj homoj miris, ke Tram volontulis iri suden por labori tie en akraj militaj kondiĉoj, penetrita de la popola ideo, laŭ kiu “eĉ virinoj devas batali, kiam venas agresantoj”, samkiel miloj da tiamaj vjetnamaj junuloj. La usonanoj ne lasis Dang Thuy Tram kaj tiom da vjetnamoj vivi en paco. Tio nutris amaran malamon ne nur ĉe la vjetnamoj, sed ankaŭ ĉe konsciencaj usonanoj. Estis pro tio, ke usona oficiro respektive konservis la du tagkajerojn de Tram kaj provis per ĉiuj rimedoj transdoni ilin al la familio de Tram.

Ĉio, kion ŝi skribis, estis por ŝi tute simpla, natura, ĉar ŝi skribis nur por si mem, sed por la

leganto, tio estis klara, nobla, bonkoreca. La libro, penetrita per la homamo de la civila doktorino, servanta ankaŭ militvunditojn, montras la doloron de kuracisto nekapabla savi la vivon de militvunditoj pro manko de medikamentoj, de rimedoj en sanatorio ĉe la fronto, la amon de la vivo, la senton de amantino, suferanta de de la malfideleco de sia amanto, sed ne falanta vizaĝalteren, ne montranta venĝodeziron kontraŭ la malfidelulo, sed ĉiam pardonema.

Legendo diras, ke post ŝia morto la usona oficiro, en kies manojn la du kajeroj hazarde falis, jam estis ĵetonta la unuan kajeron en fajron, kiam vjetnama oficiro, laborante kiel interpretisto por la usona armeo, konsilis lin ne fari tion, “ĉar en ĝi jam estas fajro”. La usona oficiro sekvis lian konsilon kaj gardis la du tagkajerojn, kies enhavon li komprenis danke al la helpo de sia frato, ankaŭ usona oficiro, kiu scipovis la vjetnaman. Tial li decideme konservis la taglibron, tenante ĝin en bona stato kaj serĉante ĉiajn rimedojn por transdoni ĝin al la familio de la mortinto.


La tridekkvinjara longa vojiro de la taglibro de Usono al Vjetnamio staras ankaŭ kiel legendo pri tiom da noblaj homoj, ĉu usonaj, ĉu vjetnamaj, por ke finfine, ĝi atingu la manojn de la patrino kaj de la fratinoj de la aŭtorino.

Responde al la demandoj de multaj konatoj la patrino konsentis publikigi la mirindan taglibron de sia filino. Poste la originala vjetnama versio estis tradukita en 18 lingvojn, inkluzive de la japana, alportante al la monda legantaro mesaĝon de paco, pri kiu Dang Thuy Tram ĉiam revis kaj por kiu ŝi ĝismorte luktis. La esperanta versio – la 19-a – farita kun permeso de la patrino de Thuy Tram, estas la rezulto de komuna elkora kaj penoplena laboro – en tradukado kaj lingva reviziado – de vjetnamaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Ni esperas, ke tiu esperanta versio atingos pliajn legantojn en pliaj landoj, kaj ke la internacia lingvo, ludante sian rolon de pontolingvo, ebligos ĝian tradukadon al pliaj lingvoj.

*(El “Verda Mesaĝo”, bulteno de la Vjetnama Esperanto-Asocio)*

### **NASA kaj geocentrismo** (*De NASA en het geocentrisme*)

Antaŭ nelonge la usonaj sciencistoj Robert Singenis, Ph.D., et Robert Bennett, Ph.D., publikigis libron en du volumoj kun entute 1006 paĝoj kaj la konsterna titolo: *Galileo was wrong, The Church was right* (Galileo malpravus, la Eklezio pravus).



En la tria ĉapitro Robert Sungenis rakontas pri siaj provoj kontakti la specialistojn de NASA por igi ilin klare diri, ĉu ili utiligas geocentrismon aŭ heliocentrismon por sendi kaj sekvi siajn spacveturilojn. Li skribas:

“NASA utiligas la pli facilan de ambaŭ sistemoj, ĉu heliocentran, ĉu geocentran. Se ĝi sendas spacveturilon en la proksimon de la suno, ĝi utiligas heliocentrismon; se ĝi metas sateliton en orbiton cirkaŭ la tero, ĝi eliras de geocentrismo.

“En aliaj cirkonstancoj NASA provas doni al la granda publiko la impreson, ke nur la heliocentra sistemo povas funkcii. En oktobro 2005 la reprezentantoj de NASA persone invitis la aŭtoron al sia reta forumo: *Demandoj kaj Respondoj*. Kelkajn semajnojn antaŭe ili respondis al demando de alia persono, kiu deziris ekscii, ĉu la spacveturiloj povas esti sendataj kaj sekvataj per la geocentra sistemo prefere al la heliocentra. La reprezentantoj nee respondis, deklarante: ‘Se la universo estus geocentra, ĉiuj niaj kalkuloj por la trajektorioj tra la spaco estus malbonaj.’ Akceptante la inviton de NASA, mi sendis formalan demandon al la retejo de NASA, demandante ilin ekspliki, kial la geocentra sistemo ne povas funkcii. Post ses semajnoj sen respondo, mi kontaktis la reprezentantojn per privataj retmesaĝoj, demandante, ĉu ili intencas respondi aŭ ne al mia demando. Ili deklaris, ke ili ne povas respondi. Mi provis konvinki ilin, ke per sia deklaro kontraŭ geocentrismo dum la publika forumo ili engaĝis sin vid-al-vid de la publiko defendi sian pozicion. Ili tamen rufuzis respondi min.

« Kiam mi sciigis al ili, ke mi publikigos la tutan historion en mia libro, ili petis min ne

mencii iliajn nomojn kaj deklaris: ‘Ni ne permesas al vi citi nin aŭ utiligi niajn nomojn en via libro aŭ via retejo. Kvankam ni laboras por NASA, ni ne estas dungitoj de NASA, kaj do prezenti nin kiel oficialajn reprezentantojn de NASA estus malĝuste kaj trompe’.

« Mi respektis ilian peton, escepte ke mi citis ilian antaŭan eldiron kaj sugestis al ili jenon: ‘Ĉu vi laboras por NASA aŭ ne, via retejo havas la adreson *nasa.gov*. Se do vi ne estas ligitaj al NASA, mi sugestas al vi trovi retejon kun alia adreso, se ne, vi trompas la publikon. Komprenoble oni povos eviti ĉiun tiun polemikon, se vi, kiel astrofizikistoj, diros al ni, kial la geocentra sistemo ne funkcias.’

« Ili ne plu respondis, kvankam alia registara agenteco en privata letero deziris sciigi al ni la veron koncerne la utiligon de mekanismo kiu eliras de senmova tero, ili rifuzis respondi al mia demando. Tio tute ne surprizis nin, ĉar pluraj miloj da eblaj legantoj estis povontaj legi tion en la interreto! Tiuj kiuj kontrolas niajn spacprogramojn havas intereson gardante la publikon en la iluzio de kopernikismo, ĉar ĉiuj iliaj subvencioj kaj projektoj baziĝas sur la kopernikaj premisoj. Nur kelkaj kuraĝaj sciencistoj denuncas la iluzion.»

« Tion faras ankaŭ la teamo de Ryong Wang kaj Ronald Hutch, du eksaj registaraj satelit-inĝenieroj, kiuj scias la veron. En artikolo pri iliaj esploroj pri la navigilo, ili skribas: ‘La *Jet Propulsion Laboratory* (JPL) uzas referencsistemon bazita sur senmova tero, la tiel nomatan sistemon ECI, por la spacveturiloj en la prok-simeco de la tero (kiel ankaŭ NASA kaj la navigilo (GPS). Sed por la malproksima spac-navigado JPL asertas uzi la ‘baricentran’<sup>1</sup> kadron ligitan al heliocentrismo’.

« Wang kaj Hutch tamen diras ‘ke por historiaj kialoj JPL faras ĉiujn siajn kalkulojn en tiu sistemo, sed ankaŭ uzas la referencsistemon ECI por korekti siajn kalkulojn faritajn laŭ la baricentra sunsistemo, tiel ke ili fine akordas kun la referencsistemo ECI! Ni klare vidas, ke la referencsistemo bazita sur la tero estas la standarda sistemo, kaj ke la baricentra sunsistemo estas fakte troa! La longdistanca spacnavigado utiligas en realeco la referenckadron ECI – la senmovan teron. Du bone dokumentitaj specialistoj, kiuj konas la aferon ĝisfunde, Wang kaj Hutch, malkaŝis la veron. Efektive, la referencsistemo bazita sur la tero (ECI), alidire geocentrismo, estas la sola

<sup>1</sup> Bari’ - de la malnovgreka ‘βαρύς’ (peza).

sistemo, kiu permesas al navigilo kaj al la diversaj spacveturiloj precize funkcii. »  
(El la revuo 'Science et Foi')

### **Malstreĉa tago en Helenaveen** (*Ontspannende dag in Helenaveen*)

Helenaveen estas vilaĝo en Peel, regiono en orienta Nord-Brabanto (Nederlando), kaj situas inter Eindhoven kaj Helmond. Tie sabaton, la 10-an de septembro, okazis la dek-unua renkontiĝo de esperantistoj el Nederlando kaj Germanio, kiuj dufoje ĉiujare alterne kunvenas en ambaŭ landoj. Partoprenis en ĝi 14 esperantistoj, inter kiuj ankaŭ kvar belgoj: tri el Limburgo kaj unu el Henegovio (Marcel Delforge).



Twan Gremmen, la iniciatinto de la aranĝo

Tuj post nia alveno iomete post la 10-a, ni ricevis kafon kaj interkonatiĝis. Je la 11.00 ni vizitis la muzeon de Helenaveen, kiu troviĝas en la etaĝo de la trinkejo "De Gouden Helm". Klarigojn pri la historio de Helenaveen helpe de la elmetitaj objektoj, fotoj kaj dokumentoj donis al ni s-ro Cruysberg en la nederlanda kaj la germana. El tio ni lernis, ke en 1853 iu Jan de Griendt el Dukarbaro aĉetis 600 ha da torftereno en Peel. La dikeco de la torftavolo variis de 5 ĝis 7 metroj. Li fosigis kanalojn por transporti la torfon per vaporŝipoj kaj eĉ eksportis ĝin al la eksterlando ĝis en Ĉinio. La vilaĝo, kiu estiĝis tie en 1858, estis nomita laŭ la antaŭnomo de lia edzino, Helena.

Post mallonga paŭzo ni veturis al la natur-aero Mariapeel, kie, post la pikniko sub la nuda ĉielo, ni faris tuthoran promenon, ĝuante la belan naturon. Kontraŭe al la pesimisma atendo, ni ne devis uzi niajn pluvombrelojn.

Reveninte al nia pikniktablo juna germana esperantistino kantis plurstrofan germanan kanton, voĉe akompanata de sia partnero kaj kelkaj aliaj partoprenantoj, kaj varme aplaudita de la aliaj post la elpaŝo.

Tiam ni veturis al IJsselsteyn, kie ni vizitis la germanan milittombejon, kien post la dua mondmilito oni transportis kaj entombigis ĉiujn germanajn soldatojn, kiuj mortis en Nederlando, entute 30.000 junajn virojn. La tombejo, granda 20 hektarojn, estis bone prizorgita kaj provizita per kariljono, kiu regule aŭtomate ludis muzikaĵon.

Sur la teraso de restoracio en Griendtsveen ni mildigis nian soifon, interbabilante ĝis la horo de la vespermanĝo. Post bongusta manĝo ĉiuj reveturis al sia hejmo ĉirkaŭ la sepa.

Laŭ la opinio de multaj, tiaj lokaj malgrandaj kunvenoj estas pli agrablaj ol grandaj kunvenoj pro la speciala, amikeca etoso: ĉiuj parolis kun ĉiuj, kaj nur en Esperanto.

*Pieter Jan Doumen*

### **Novajoj el Esperantolando**

(*Nieuws uit Esperantoland*)

**Usono 1** – *Kial ESF estas subteninda?* –

ESF estas la mallongigo de la usona fondaĵo *Esperantic Studies Foundation* (Fondaĵo por Esperantaj Studoj). Ĝi subtenis aŭ subtenas interalie jenajn Esperantajn iniciatojn :

- lernu.net,
- edukado.net,
- Springboard to Languages (Esperanto kiel saltotabulo al aliaj lingvoj),
- la filmon « Pasporta al la tuta mondo »,
- la informfilmon « Esperanto estas... »,
- la dokumentfilmon pri Esperanto « The Universal Language » de Sam Green,
- tekstaro.com por trovi la historian uzon de iu vorto,
- la plurjaran laboron de UEA por konservi la enhavon de la Biblioteko Hector Hodler.

Ĉiuj tiuj projektoj estis realigitaj dum la lasta jardeko, sed ESF ekzistas jam de 1968. Ĉiuj el ili (kaj multaj aliaj) ricevis gravan financon subtenon de ESF. Pli frue ankaŭ en la Nord-Amerika Kursaro (NASK), fondita en 1970 de Cathy kaj Bill Schulze, ricevis subvencion.

ESF ankoraŭ subvencias esploristojn kaj Esperanto-kursojn, sed multajn jarojn post la fondiĝo de ESF la mondo ŝanĝiĝis. Aperis interreto, kaj en 1999 ESF ricevis signifan monsumon per la testamento de Bill kaj Cathy Schulze, konataj usonaj esperantistoj. ESF

subite povis subteni multajn projektojn, kio estus nepensebla nur kelkajn jarojn antaŭe, pro la teknologiaj kaj finanĉaj rimedoj disponigitaj al ĝi.

En 2002 naskiĝis **lernu.net**, kiu nun estas la plej granda Esperanto-komunumo en la mondo. S-ro Liebermann, kunfondinto de ESF, rakontas, ke « niaj laboroj havis malgrandan efikon ĝis la invento de interreto, kiam per lernu.net io grava naskiĝis ». **lernu.net** estas senpaga paĝaro, kiu ofertas multege da lerniloj kaj aliaj rimedoj al siaj lernantoj. Ĝi ricevis ĝis nun pli ol € 280.000 de ESF. La paĝaro estas tradukita en 37 lingvojn. Pli ol 48.000 uzantoj loĝas en Eŭropo, 35.000 en Ameriko, 11.500 en Azio, 3.000 en Oceanio kaj 2.600 en Afriko. Estas *lernu!*-uzantoj en amaso da landoj kiuj ne havas Esperanto-asocion.

Por festi la registriĝon de ĝia 100.000-a uzanto (nun jam 103.000), *lernu.net* lanĉis kunlabore kun *E@I* donackamponjon por subteni ESF. La celo estas kolekti € 100.000 por ESF antaŭ la 15-a de decembro 2012. Tio estas ambicia tasko, sed ĝi povas esti realigita, se multaj Esperantistoj subtenos tiun iniciaton. Speciale por tiu kampanjo estis funkciigita aparta retpaĝo <http://kampanjo.ikso.net>, ĉe kiu eblas trovi detalajn informojn.

*Mark Fettes, vic-prezidanto de ESF*

#### **Brazilo** – Nova Esperanto-klubo en Florido –

Samideano Robb Kvasnak estas usona esperantisto, kiu antaŭ kelkaj monatoj vizitis Rion kaj prelegis en la Kultura Kooperativo de esperantistoj. Ĉi-sube mi sendas al vi retmesaĝon lian, kiun mi ricevis, ĝoje informante min pri la fonda de loka klubo en Florido. Ili bezonas instigon! Do mi petas tiujn kiuj povas sendi retmesaĝon, gratuli lin kaj la aliajn pro la iniciato. Mi kore dankas vin! Samideane, Aloísio Sartorato, Rio, Brazilo. Jen lia letero:

Kara Aloísio! Mi ĵus revenas de la fonda renkontiĝo de nia nova E-klubo ĉi-tie en Florido. Mi devas lerni de vi kiel organizi, ĉar la klubo de Rio-de-Ĵanejro estas laŭ mi vera sukceso. Ni estis ses homoj: komencanto, mez-nivelulo kiu parolis Esperanton por la unua fojo, Edmar, veterana esperantisto el Kubo kun sia filino (ankaŭ bona parolantino) kaj mi! Ni sidis du kaj duonan horon kune kaj lernis multe unuj de aliaj. Mi tiom feliĉas! Robb.

Robb Kvasnak, Ed.D.

Professor of Education, ESOL

[www.robbkvasnablog.blogspot.com](http://www.robbkvasnablog.blogspot.com)

[www.linguisticblog.blogspot.com](http://www.linguisticblog.blogspot.com)

**BOUW  
EXPO  
TEGELEXPO  
MIX-BETON  
BOUWMATERIALEN**  
DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,  
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKENI  
**PAESEN**  
EEN ZAAK VAN VERTROUWEN!  
TEGELEXPO 011 66 55 54  
BOUWEXPO 011 66 55 50

#### **Ĉinio** – Esperanto-insulo konstruas ponton –

Sude de Ĉinio, tre proksime al Vjetnamio, en la klimato tre agrabla suda insulo Hajnan, prepariĝas evento, kiu certe ne restos senspura en la historio de la Internacia Lingvo: Esperanto-insulo!

Temas pri intensiva lernado kaj praktikado de Esperanto dum 8 horoj ĉiutage, kaj tio dum unu tuta monato, de la 11-a de januaro ĝis la 12-a de februaro 2012. Povas partopreni ankaŭ komencantoj kaj nefluaj parolantoj de Esperanto. Okazos treege intensaj kursoj: du instruistaj kaj tri universtitataj. Detaloj aperos ĉe <http://www.esperanto-insulo.info/kurso-specoj.htm>.

En la pli kaj pli internacia listo de la partoprenantoj de tiu bone envojigita projekto, inkluzive de la kursgvidantoj, aperas ĝis nun 57 nomoj (+3 koreoj partotempe) el Ĉinio kaj 13 aliaj landoj de 3 kontinentoj. Sekve Esperanto havas nature sian lokon en insulo, kiu laŭ informo de la *Ĉina Radio Internacia* “sin dediĉas por esti internacia turisma insulo”.

Unua publika artikolo aperis en Libera Folio ĉe <http://www.liberafolio.org>. Informoj aperas ankaŭ kun fotoj ĉe *Esperanto-Insulo* kaj *Ĉina Interreta Informa Centro*.

Interesatoj pri tiu internacia diversnivela kursaro de Esperanto povas turni sin al Dennis Keefe en la angla, franca kaj hispana, se ilia scipovo de Esperanto estas nesufiĉa. Ĉinlingvaj nescipovantoj de Esperanto povas turni sin al Trigo. Same, se vi deziras ricevi rektajn informojn, eĉ se vi ne povos partopreni ĉi-foje. Eblas ankaŭ finance subteni la iniciaton per ĝiro de monsumo al la konto de UEA “eins-t” kun la mencio “por Esperanto-insulo”.

*Henri Masson, Francio*

### **Germanio – Interveno de UEA ĉe UN –**

Kvin reprezentantoj de UEA partoprenis la ĉi-jaran Konferencon de Neregistaraj Organizaĵoj, kiun la Departemento pri Publika Informado de UN okazigis en Bonn (Germanio) de la 3-a ĝis la 5-a de septembro okaze de la *Eŭropa Tago de la Lingvoj*. Tiu ĉi plej grava ĉiujara evento de UN por NRO-oj okazis por la 64-a fojo kaj havis la temon *Daŭrigeblaj socioj – respondecaj civitanoj*.

La konferencon malfermis Kiyō Akasaka, asista ĝenerala sekretario de UN pri komunikado kaj publika informado. Ĝenerala sekretario Ban Ki-Moon salutis la inaŭguron per video-mesaĝo.

Kiel deligitoj de UEA partoprenis Marcos Kramer, Stefano Keller, Mélanie Maradan, Julia Noe kaj Manfred Westmayer. Dum la konferenco ili havis multajn okazojn interparoli kun reprezentantoj de aliaj NRO-oj kaj interŝanĝi ideojn kaj informojn.

La teamo de UEA aktive diskonigis la starpunktojn de UEA pri lingvaj rajtoj kaj lingvodiverseco, komentante i.a. tion, ke nur la angla estas laborlingvo de la konferenco. Al la demando de Keller pri la kialo, Maria-Luisa Chávez, ĉefino pri la rilatoj de UN kun NRO-oj, respondis, ke tion kaŭzis manko de mono. Ankaŭ ŝi bedaŭris la neblon uzi pli da lingvoj.

Dum unu el la rondtablaj diskutoj Keller demandis al la reprezentanto de PepsiCo, ĉu lia firmao ne povus per subvencioj ebligi ankaŭ la uzon de aliaj oficialaj lingvoj ĉe UN ol nur la angla. La reprezentanto respondis, ke pri tio oni skribu al la oficejo de PepsiCo.

En la findeklaro de la konferenco, kiun oni prezentos la lastan tagon, mankis la elpaŝoj de UEA pri lingvaj rajtoj kaj lingvodiverseco, kontraŭ kio protestis Maradan. Dum la lastaj tagoj oni plu laboros pri la deklaro. Kia ajn ĝi estos, ĉiuj ĉeestantoj aŭdis pri Esperanto kaj UEA kaj ilia defendo de la lingvaj minoritatoj.

*(Henri Masson, Francio)*

### **Rusio – Hanojen per la transsiberia fervojo –**

Julie 2012 ĉiu esperantisto havos la okazon efektiviĝi 2,5-semajnan vojaĝon tra Rusio kaj Ĉinio (pli ol 12000 km) al la 97-a Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio, kiu okazos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto.

La partoprenantojn en la karavano atendas konatiĝo kun vidindaĵoj de Moskvo, vizitoj al koncerto kun rusaj dancoj kaj al muzeo de rusa vodko. Pertrajne, laŭ la transsiberia fervojo,



Loka Kongreskomitato (LKK) de Hanojo

kiu ligas Eŭropon kun Azion, la E-karavano atingos la urbon Irkutsk kaj la faman lagon Bajkal. En Pekino lokaj esperantistoj konatigos la karavananojn kun vidindaĵoj de sia ĉefurbo.

La antaŭajn E-karavanojn tra Rusio – al la Universala Kongreso en Jokohamo (Japanio) en 2007 kaj al la Sesa Azia E-Kongreso en Ulanbatoro (Mongolio) – partoprenis geesperantistoj el Belgio, Francio, Italio, Nederlando, Portugalio, Rusio kaj Usono. La transsiberia fervojo, konstruita antaŭ pli ol 100 jaroj, estas nun potenca, dudirekta elektrigita fervojo. Ĝia unikeco konsistas ne nur en ĝia longeco de 10.000 km de Moskvo ĝis Vladivostoko, sed ankaŭ en tio, ke ĝi donas al aziaj landoj la plej rapidan aliron al Eŭropo.

La vojaĝon al Hanojo organizas s-ino Tatjana Loskutova, instruistino kaj UEA-delegitino en Ivanovo, Rusio, [lota49@mail.ru](mailto:lota49@mail.ru).

*Tatjana Loskutova,*

### **Nia rakonto: La domo de Eŭlalia (2)**

*(Ons verhaal: Het huis van Eulalie (2))*

Merkrede ni jam estis veturantaj dum ĉirkaŭ duona horo sen paroli, kiam subite Leroux diris al mi:

“La ĉambro, Sinjoro, la ĉambro pri kiu vi pensis, ke ĝi estas okupita...”

“Jes?” mi demandis, kiam li ekpaŭzis.

“Mi volas proponi ion,” li diris. Ŝajnis al mi, ke li parolis duone timide, duone decideme, rigardante intertempe la orelojn de sia ĉevalo.

“Kion vi volas proponi?” mi demandis.

“Se vi volus lasi la ĉambron tia, kia ĝi estas, kun la aferoj kiuj estas en ĝi, ni volonte rabatus la luprezon. Se vi bonvolus lasi nin gardi ĝin tia, kia ĝi estas,” li ripetis, pledante kun stranga intenseco. “Vi estas sola. La domo estos sufiĉe granda por vi sen tiu ĉambro, ĉu ne, Sinjoro?”

Kompreneble mi tuj konsentis. Se ili dezirus gardi la ĉambron tia, kia ĝi estas, ili povus ĉiakaze fari tion.

“Dankon, multan dankon. Mia edzino estos dankema al vi,” li diris.

Iom da tempo ni veturis sen diri unu vorton.

“Vi estas nia unua luanto,” li diris tiam spontane. “Ni neniam ludonis la domon antaŭe.”

“Ho? Ĉu vi havas tiun domon jam longe?” mi demandis.

“Mi konstruigis ĝin antaŭ kvin aŭ ses jaroj,” li respondis. Tiam post paŭzo, li aldonis: “Mi konstruigis ĝin por mia filino.”

Lia voĉo sinkis, kiam li diris tion. Sed mi sentis, ke tio estas nur la komenco de io, kion li deziris diri. Mi invitis lin daŭrigi per interesata “Ho?”

“Vi vidas, kio ni estas, mia edzino kaj mi,” li diris. “Ni estas maldelikataj homoj, ni estas kampuloj. Sed mia filino, Sinjoro,” kaj li metis la dekstran manon sur mian genuon, serioze rigardante al mia vizaĝo, “sed mia filino estis tiel delikata kiel sateno, kiel punto.”

Li denove turnis sin al sia ĉevalo kaj silente veturis dum kelkaj minutoj. Finfine, ĉiam rigardante la orelojn de la ĉevalo: “En la tuta regiono troviĝis nenia sinjorino pli delikata ol mia filino,” li daŭrigis, rapide parolante per emociita voĉo kvazaŭ al si mem. “Ŝi estis tre bela, ŝi havas dolĉan karakteron kaj ŝi ricevis la plej bonan edukon. Ŝi estis edukita en la lernejo de la monaĥinejo Sankta-Koro de Jesuo en Ruano. Dum ses jaroj – ekde sia dek-dua ĝis sia dek-oka – ŝi studadis en la monaĥinejo. Ŝi scipovis la anglan, Sinjoro, vian lingvon. Ŝi ricevis premiojn pri historio. Kaj la piano! Neniu viva povis tuŝi la pianon kiel mia filino! Nu,” li abrupte demandis iel violente, “ĉu maldelikata kampuldomo estis sufiĉe bona por ŝi?” Li respondis al sia propra demando. “Ne, Sinjoro. Oni ne metas delikatan puntaĵon en malpuran skatolon. Mia filino estis pli delikata ol punto. Ŝiaj manoj estis pli dolĉaj ol veluro el Liono. Kaj ho,” li ekkriis, “la dolĉan odoron ili havis! Estis agrable flari la odoron de ŝiaj manoj. Mi kisis kaj priflaris ilin, kiel oni priflaras rozon.” Lia voĉo malfortiĝis ĉe la memoraĵo, kaj estiĝis alia intervalo de silento. Post iom da tempo li rekomencis paroli: “Mi havis multe da mono. Mi estis la plej riĉa kampulo en tiu ĉi najbarejo. Mi venigis faman arĥitekton el Ruano, sinjoron Clermont, la plej bonan tiean arĥitekton, laŭreaton de la Belarta Lernejo de Parizo. Li konstruis kaj ekipis tiun domon por mia filino kvazaŭ ŝi estus dukino, tiel ke, kiam ŝi estis revenonta por ĉiam de la monaĥinejo, ŝi ekhavu domon dignan je ŝi. Konsideru la aferon tiel ĉi, Sinjoro: ĉu la plej

*Met de hartelijke groeten van  
Kun la koraj salutoj de*

**KBC-Bank Hechtel**

Rode Kruisplein 5

B-3940 Hechtel

Tel. 011-73.02.20

Fax 011-73.02.21

[hechtel@kbc.be](mailto:hechtel@kbc.be)

bela palaco en la tuta mondo estus sufiĉe bona por ŝi?”

Li tiris eluzitan ruĝledan paperujon el sia poŝo kaj prenis el ĝi malgrandan foton, kiun li donis al mi. Estis la portreto de delikataspekta knabino de proksimume dek sep jaroj. Ŝia vizaĝo estis beleta kun la neregula beleco kutima en Francio, sed ŝi estis tre dolĉa kaj aminda. La maljunulo preskaŭ retenis sian spiradon, dum mi ekzamenis la foton.

“Ĉu ŝi ne estas bela? Ĉu ŝi ne estas aminda, Sinjoro?” li petegis min kun vera aspiro je simpatio, kiam mi redonis ĝin. Kompreneble mi respondis tiel bone kiel mi povis. Per tremantaj fingroj li remetis la foton en la paperujon.

“Jen, sinjoro,” li diris, tirante malgrandan blankan karton el la kontraŭa fako. Estis la kutima franca funebra memoraĵo: bildo reprezentanta krucon kaj kolombon, sub kiu estis presita: ‘Eulalie-Josephine-Marie Leroux, naskita la 16-an de majo 1871, mortinta la 12-an de aŭgusto 1892. Preĝu por ŝia animo’.

“La bona Dio scias, kion Li faras. Mi konstruis tiun domon por mia filino, kaj kiam ĝi estis finkonstruita, la bona Dio forprenis ŝin de ni. Ni freneziĝis pro malgoĵo, mia edzino kaj mi, sed tio ne povis savi ŝin. Eble ni estas ankoraŭ ĉiam frenezaj pro malgoĵo,” simple diris la povra maljunulo; “Ni povas pensi pri nenio alia. Ni neniam deziras paroli pri io alia. Ni ne povis vivi en la domo, ŝia domo, sen ŝi. Ni neniam intencis ludoni ĝin. Mi konstruigis tiun domon por mia filino. Mi mebligis ĝin por ŝi, kaj kiam la domo estis preta por ŝi, ŝi mortis. Tio estis tre malfacila por ni, Sinjoro. Kiel mi povus ludoni la domon al fremduloj? Sed antaŭ nelonge mi suferis perdojn. Mi estas devigita ludoni ĝin por povi pagi miajn ŝul-



dojn. Mi ne volis ludoni ĝin al iu ajn. Vi estas anglo. Nu, se vi ne plaĉus al mi, mi ne ludonus ĝin al vi por miliono da anglaj pundoj. Sed mi ĝojas, ke mi ludonis ĝin al vi. Vi respektos ŝian memoron. Kaj vi permesas al ni gardi tiun ĉambron, ŝian ĉambron. Ni intencas gardi ĝin tia, kia ĝi estis, kun ŝiaj aferoj en ĝi. Jes, tiu ĉambro, pri kiu vi pensis, ke ĝi estas okupita, estis la dormoĉambro de mia filino.”

Sinjorino Leroux estis atendanta nin en la ĝardeno de la ĉaledo. Zorgoplena ŝi rigardis sian edzon, kiam ni alvenis. Li kapjesis kaj kriis: “Ĉio estas en ordo, la sinjoro konsentas.”

La maljuna virino prenis miajn manojn, preskaŭ historie tordante ilin.

“Ha, Sinjoro, vi estas bonkora viro,” ŝi diris. Ŝi levis siajn okulojn al la miaj, sed mi ne kuraĝis rigardi en ŝiajn okulojn. En ili estis ia malĝojo, ia sankta tristeco, kaj mi sentis, ke estus kvazaŭ sakrilegio, se mi rigardus en ilin.

(*Daŭrigota, Henry Harland*)

## Limburga Esperanto-Asocio

### Pasintaj aktivaĵoj de LEA en septembro kaj oktobro 2011:

Ĵaŭdon 29.09.2011:

Sep entuziasmaj esperantistoj el Belgio kaj Nederlando rakontis en Esperanto pri siaj ferioj aŭ kion ili faris se ili restis hejme.

Ĵaŭdon 27.10.2011:

An Olijslagers gvidis skrabloludon por ses partoprenantoj. Tre amuza kaj instruiga ludo.

### Venontaj aktivaĵoj de LEA en novembro kaj decembro 2011:

Ĵaŭdon 24.11.2011:

Pieter Jan Doumen prelegos pri la tre sanga usona interna milito, kiu komenciĝis antaŭ precize 150 jaroj kaj disŝiris la landon en du.

Ĵaŭdon 15.12.2011:

Zamenhoffesto en la restoracio “De Boskar”, Markt 1, Peer, organizita de Rik Leijskens. Kosto: ĉirkaŭ 15 eŭroj.

Ĉiuj esperantistoj, membroj de LEA aŭ ne, eĉ se ili ankoraŭ neniam venis, estas tutkore bonvenaj kun sia partnero. Se vi intencas veni, bonvolu averti pri tio Rik Leijskens. Lia ret-adreso: [stefan.leijskens@pandora.be](mailto:stefan.leijskens@pandora.be). Vi povos pagi surloke aŭ per ĝiro al la bankkonto de LEA ĉe KBC n-ro 735-0190144-12.

## Senpagaj Esperantaj libroj!

Se vi volas mastri lingvon – ankaŭ Esperanton – vi devas multe legi tiun lingvon. Tiel vi akriĝas vian lingvosenton. Senkonscie vi asimilas vortojn, strukturojn kaj frazojn.

Tial mi prezentas al ĉiuj esperantistoj *senpage* kelkajn librojn, kiujn mi tradukis. Por facyligi al vi la legadon, mi tajpis la tekstojn en du kolonoj sur folioj de la formato A4.

Sufiĉas, ke vi sendu al mi retmesaĝon kun la mencio, kiu(j)n libro(j)n vi deziras ricevi. Mi tiam sendos ĝin (ilin) al vi retpoŝte.

Jen la titolojn de la libroj kun kelkaj vortoj pri ilia enhavo kaj formo:

### Renardo la Vulpo:

Fama mezepoka historio pri la ruza Vulpo Renardo, kiu estas kondamnita al morto pro siaj krimoj, sed sukcesas eskapi al sia sorto. La poemo enhavas 4.140 senrimajn versojn sur 45 paĝoj, kiuj legiĝas kiel prozo.

Ĝi ankaŭ haveblas *libroforme* kun belegaj desegnaĵoj de fama desegnisto en la formato 21 x 14.5 cm, 164 paĝoj, prezo 12,00 eŭroj + sendokostoj (kiu dependas de la lando).

### Karlo kaj Elegasto

Fama frumezepoka kavalirromano pri Karlo la Grando, kiu ricevas de Dio la strangan ordonon iri ŝteli dum la sama nokto. Kun rabistkavaliro Elegasto li penetras en la kastelon de Egeriko kaj tiel ekscias, ke tiu ĉi volas murdi lin kaj ke li, Karlo, maljuste punis Elegaston. La morgaŭon Elegasto mortigas Egerikon en duelo kaj estas restaŭrita en ĉiuj siaj rajtoj.

La poemo enhavas 56 paĝojn kun 1434 senrimaj versoj, kiuj legiĝas kiel prozo.

### Soldato de Napoleono

Historia romano en du partoj, ‘Konskripto de 1813’ (71 p.) kaj ‘Waterloo’ (83 p.) pri junulo, kiu iomete lamas per unu kruro, sed tamen devas servi, kiam Napoleono revenas el Rusio. Li estas antiheroo, kiu humore kaj ofte sarkasme kritikis la politikajn kaj militistajn eventojn kaj intertempe revas pri sia amatino Trinel. Preciza priskribo de la tiama vivo de la ordinaraj homoj kaj de la politikaj kaj militistaj eventoj. En la XIX-a jarcento la romano jam havis 43 eldonojn! Tre interesa kaj valora libro.